# LA VERDA LUPEO




*INFORMILO de ELF/AREK*

***Decembro 2023*** ***55-a jaro*** ***N-ro 194***

***Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj***

**Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen**
**Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste**
**James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP**




## 1894-2024: 130 jaroj de la naskiĝo de MAKSIMILIANO MARIA KOLBE

## KARAJ GELIGANOJ, KARAJ GEAMIKOJ!

Tutunue, mi deziras al vi ĉiuj kaj al viaj familioj plej bonan daŭrigon de la 2024-a Jaro!

Kion rakonti al vi? Ke Elf-Arek aktivis, laŭ sia eblo, ekzemple partoprenante en la UK Torina. Ĝi prezentis sin en salono luita por la okazo, antaŭ ne tiom multnombra spektantaro sed la ĉeestintoj montris sian intereson, dum aŭskultado de la klarigoj kaj rigardado de la bildoj prizorgitaj de James Rezende Piton kaj mi. Kio min feliĉigis, estis la fakto, ke malgraŭ la du-hora kunveno, al mia demando: *Ĉu ni faru kvaron-horan paŭzon?*, ĉiuj respondis: *Neee!!!* Do, signifoplena respondo, ĉu?

La plej aktiva ĉi-jare el la Liganoj, ĉu rete ĉu persone, estis la verve ĉionfaranta kaj dise aganta James, kiu aktivis ne nur en esperantistaj rondoj, sed ĉefe en tiuj brazilaj, propagandante pere de filatelo niajn Lingvon kaj Ligon. Daŭre funkcias la kunlaboro kun *Il Postalista,* en kiu aperas la artikoloj pri Esperanto en Filatelo, danke al la laboro de Alessandro Bellucci. Laŭ la statistikoj pretigitaj de la retejestro, tiuj estas legataj de pluraj personoj.

Via prezidanto, ekde la pasinta jaro, iomete strikis, ĉar la aperritmo de LVL montras, ke ne plu ŝi respektis la aperdatojn. Pro tio ŝi klinas la kapon, pardonpetante kaj promesante forigon de la malfruo. Almenaŭ ŝi klopodos!!! Al 7a paĝo

## ENHAVO



| | |
|---|---|
| Elda DOERFLER - *Vortoj de via prezidanto (sekvo je paĝo 7-a)* | 2 |
| Elda DOERFLER - *Sankta Maksimiliano Maria Kolbe - misiisto, ekumenisto, martiro, esperantisto* | 3 |
| Albert BOON - *Hiatoj en la historiografio de la Esperanto-Movado - Esperanto en la faŝista epoko (2)* | 8 |
| James REZENDE PITON - *Ŝtatprezidinto, kiu simpatiis Esperanton* | 10 |
| James REZENDE PITON - *Librairie HACHETTE en filatelaĵo* | 11 |
| *EK al EEK 2024 en Strasburgo!*<br>**Danke al kontribuoj de** Goar Engeländer, Michel Basso, Manuel Parra, Esperánto-France, Germana Esperanto-Asocio, **aranĝis** E.D. | 13 |
| Elda DOERFLER - *IPM el Pollando* | 15 |
| Elda DOERFLER - *Kiuj Esperanto-aĵoj kolektindas?* | 18 |
| EN POŜTOKESTO - *Liganoj skribas, ke ...* | 22 |
| Elda DOERFLER - *Interesa kaj fruktodona ret-kunveno* | 23 |


KOVRILO - **VATIKANO**. Poŝtmarko emisiita 13.09.2016, okaze de la 75-a mortodatreveno de Maksimiliano Kolbe. Mezuroj: 30x40 mm; 150 000 ekzempleroj.

# Sankta Maksimiliano Maria Kolbe:
## Misiisto, Ekumenisto, Martiro, Esperantisto

*Elda Doerfler*

Franciskano Maksimiliano Maria Kolbe, naskiĝinta la 7-an de januaro 1894 en la pola urbo Zduńska-Wola de fervoraj kristanaj gepatroj, estas konata en la katolika mondo ne nur pro siaj beatiĝo kaj sekva sanktuliĝo, sia plej sublima sinofero kiu alkondukis lin al suferega morto, sed ankaŭ pro sia aktiva laborado propralande kaj eĉ en Japanio. Kaj plie pro sia esperantisteco.




En 1917, kune kun aliaj kunuloj, li fondis la Milicion de Senmakula Maria (latine ***M**ilitia **I**mmaculatae*, mallonge ***M**.**I**.*), en kiu asociiĝis homoj de bona volo konsekritaj al la Sinjoro per la Virgulino.

Je 42 km de Varsovio, sur 28-hektara tereno donacita de grafo Drucki-Lubecki en 1927, li ekkonstruis la *Urbon de la Senmakula*, 'Niepokalanów', kiu unuatempe konsistis el nur tri barakoj plus eta kapelo ligna. Per intensa laborado ĝi pli kaj pli ampleksiĝis kaj en 1931 la monaĥeja kvartalo inkluzivis: preĝejon, eldonejon, loĝejojn por la franciskanoj, pilgrim-domon kaj eĉ fajrobrigadejon, mastrumitan de grupo da volontulaj religiaj fratoj.

La Urbo fariĝis Centro de evangelizado ankaŭ danke al vasta diskonigado per ĵurnaloj kaj radio: li mem radio-amatoro, ekfunkciigis radio-stacion, inaŭguritan en decembro 1939. Krom tio la franciskano redaktis la ĵurnalon *Kavaliro de la Senmakula*, kiu atingis la nekredeblan nombron de 750 mil kopioj. Antaŭmilite la tutan konstruaĵaron, en kiu laboris kaj vivis 772 personoj, oni konsideris unu el la plej grandaj katolikaj monaĥejoj en la mondo.

Per vorto kaj per skribo li realigis vive viglan misiistan apostoladon en Eŭropo kaj eĉ en Azio: Ĉinujo, Japanujo, Barato. Malgraŭ sia ege malstabila sanstato kaŭzita de tuberkolozo, li forte celadis por diskonatigi la spiriton de sia entrepreno. Ekde 1933 jam en diversaj partoj de la Tero estis fonditaj multnombraj *Urboj de Maria*, dum la ekzempleroj de lia ĵurnalo atingis la ne malgravan pinton de unu miliono da publikaĵoj.

Ĉe la altaro de la preĝejo en Niepokalanów, ankoraŭ nuntempe, staras memortabulo, dulingva, pole kaj Esperante, sur kiu aperas konkretaj signoj de lia esperantisteco. *(vidu en sekva paĝo)*




*B. Maksimiliano Maria Kolbe pri la internacia lingvo Esperanto:*
KAVALIRO ESPERANTO trovus certan sukceson eĉ ĉi tie en Japanujo…
*El letero al P. F. Nazim*
*Mugenzai no Sono, 1931*
Via partopreno en la Esperanto Mondmovado plaĉas al la Senmakula.
*Koresponde al polaj*
*Esperantistoj, 1937*

*Omaĝe al sia Ĉiela Patrono*
*Pola Katolika Unuiĝo Esperantista*



De 1930 ĝis 1936 kun 4 fratoj li estis en Japanujo, kie, kompreninte la karakteron de la lokanoj altgrade kontemplan, li establis la *Milicion,* eldonejon kaj *Urbon de la Senmakula*. Per sia ĵurnalo, eldonita en ĉ. 12 mil kopioj, *Kavaliro Esperanto* disverŝadis siajn vortojn [*maldekstre foto de la japanlingva ĵurnalo.* Vidu ĉe *rivista cattolica.it*]. Urbo *Mugenzai no Sono*, situanta piede de montaro Hikosan, konsistis el komunaj preĝejo, renkontiĝejo, kunvenejo, eldonejo: ĝuste tie komenciĝis, ĉefe por la vizitantoj, spirita itinero ĝis la montopinto, kie troviĝis groto, reproduktaĵo de tiu en *Lourdes*.



En la foto, Sankta Maksimiliano, kun aliaj religiuloj kaj japanaj lernantoj

Ĉi monaĥejo, kiam la atombombo trafis Nagasaki-n je la 9-a de aŭgusto 1945, estis la vivsavejo kaj rifuĝejo por multaj orfoj el tiu urbo.

Mirigas la informo, ke la japana revuo de M. Kolbe - *Seibo no Kishi* (traduko: *Kavaliro de la Dia Patrino*) - estis legata ne nur de japanaj kristanoj, sed ankaŭ de fideluloj apartenantaj al aliaj religioj. Maksimiliano Kolbe kunlaboris kun hebreoj, protestantoj, budhistoj, kunserĉante la veron ekzistantan en ĉiu ajn kredo.

En 1939 li reiris definitive al Pollando kaj je la 1-a de septembro, kiam lia Lando estis invadita de la germana armeo, li ekkonsciis, ke en baldaŭa tempo estos detruita lia tuta vivoverko, eĉ iel li antaŭsentis sian baldaŭan vivofinon. En tiu dato la *Urbo de la Senmakula* estis ruinigita kaj la fratoj dise ekiradis tra la mondo. Dufoje li estis malliberigita, kune kun kvar kunfratoj, kaj dufoje liberigita, ĝis kiam, fine de majo 1941, oni lin deportis al *Auschwitz*, kie li ricevis la numeron 16670. Kun




*13 septembro 2016 - Vatikana Urbo - Unuataga emisio.*
*75-a mortodatreveno de Sankta Maksimiliano Maria Kolbe.*
*Stampo kaj Poŝtmarko dediĉitaj.*

aliaj hebreoj li estis submetita al plej humilaj laboroj, el kiuj la transporto de kadavroj al kremaciejo. Ĝis kiam, fine de julio 1941, iu malliberulo kuraĝis provi eskapi el tiu terurejo: konsekvenco de tio estis, ke, laŭ la kruela koncentreja leĝo, la kampo-vicestro arigis dek homojn, kiujn li kondamnis al malsat- kaj soif-morto, en subtera bunkro, el kiu forfuĝi neniel estis eble. Iumomente, unu el la elektitaj malfeliĉeguloj, *Franciszek Gajowniczek*, ekkriis: “Mi havas edzinon kaj du filojn!”




*1982 - Pollando. Pm-o emisiita okaze de lia sanktuliĝo.*


Intervenis senhezite M. Kolbe: li oferdonis sian vivon, mempetante morti anstataŭ tiu viro, pretekste ke li estas katolika pastro kaj krome, pli maljuna ol la elektito.

La vickomandanto akceptis kaj la dek homoj eniris la malsatbunkron. Post 14 tagoj restis vivaj nur kvar, el kiuj Maksimiliano Kolbe: la SS-anoj decidis, por ne perdi tro da tempo, mallongigi ilian vivtempon per injektado de karbolacido. Oni aŭdis de li nur du vortojn: *Ave Maria.*

Estis la 14-a de aŭgusto 1941.





El la revuo *Seibo no Kishi*: Vivo kaj verko de Maksimiliano Kolbe, per bildoj kaj kun japanlingvaj klarigoj.




*Poŝtkarto el la jaroj 1971-72, eldonita de Esperanto-Centro, Luksemburgo. Papo Sankta Pio la 10-a kaj Beata Maksimiliano Kolbe, la du patronoj de katolikaj esperantistoj.*

La plej lasta pm Liahonore aperis la 5-an de oktobro 2023 en Germanio: per ĝi oni memorigis la kvindekjariĝon de la Pola-Germana Organizo *Maksimiliano Kolbe*. En 1973, preskaŭ tridek jaroj post la militfino, kelkaj germanaj katolikoj fondis ĝin por komenci procezon de repaciĝo kun la polaj viktimoj de la naziaj koncentrejoj. La devizo de tiu socieo estas: *Helpi - Renkonti - Memori*. Vere honorinda iniciato!




Sekvo de la 2-a paĝo

Ĉar la prezidanto de ELF-AREK estas samtempe ties kasisto, kune kun ĉi LVL, oni ricevas ankaŭ la kontoeltiron de 2023-a jaro. La financa situacio ne malbonas, sed pro malpliiĝo de membroj kaj plialtigo de kostoj (rilataj al la presado kaj sendo de nia organo, plus (ne ĉiujara!) mendo de kunvensalono dum UK, kaj la jara pago kiel UEA-Kunlaboranta Fak-Asocio), la sumo de la kotizoj apenaŭ sufiĉas por kovri ĉiujn elspezojn. Sekve, ni KUNE devas pristudi strategion por malproksimigi la danĝeron de malapero de nia Ligo. Post kiam vi estos ricevintaj la eltirkonton, mi proponas ret-kunvenon, por diskuti kaj kunrezonadi pri la financa stato, pri disvastigado de Esperanto en filatelaj medioj, pri strategio por allogi novajn membrojn ktp. Kiom da kapoj, tiom da opinioj kaj ideoj: nu pretiĝu, ĉar nepre mi DEZIRAS AŬSKULTI ĈIES VOĈON, por eliri el iom stagnanta situacio. Krome estus dezirinde, dediĉi iom da atento al la enhavo de nia LVL, kiu bezonas pliriĉiĝi ankaŭ per viaj kontribuaĵoj.

Mi profitas de ĉi tiu okazo por danki la kotiz-pagintojn jam en pasinta decembro kaj tiujn plenumintajn januare/februare, kaj alvokas nepagintojn kunhelpi en la kasoplenigo. Koran dankon pro la atento kaj ĝis baldaŭ! E.D.

# HIATOJ EN LA HISTORIOGRAFIO DE LA ESPERANTO-MOVADO

## *ESPERANTO EN LA FAŜISTA EPOKO (2)*

*Albert BOON*


**“Esperanto-anoj estas**
**nek anĝeloj, nek diabloj.”**
*Elda DÖRFLER*

*Kiel juna instruisto dum unu lernojaro (1976-1977) mi laboris en brusela gimnazio en la centro de la eŭropa ĉefurbo.*

*Famega antikvaĵo en la najbareco jam delonge allogis min, sed mia financa situacio tute ne estis fanfaroninda. Iun tagon mi tamen eniris kaj demandis al la butikisto, ĉu li eble ankaŭ havus “esperantajn objektojn”. Pripensinte, li al mi enmanigis maldikan libreton kun malmola, nigra koverto, sur kiu brilis orecaj literoj kaj la nomo de la fifama itala diktatoro BENITO MUSSOLINI. Mi apenaŭ kredis miajn okulojn, sed la titolo estis vere en Esperanto. Malgraŭ la por mi alta prezo, mi aĉetis ĝin, samtempe konsternita kaj scivolema, sed ne pro la prezo!*

*Verkante ĉi tiun artikolon nun, mi konfuzite rigardas ĝin, kuŝantan antaŭ mi sur la tablo…*

El la vidpunkto de nia samideanaro kaj de esperantistaj historiistoj, almenaŭ unu eminentulo ne povas esti konsiderata kiel “anĝelo”, malgraŭ liaj famo kiel tradukinto kaj malgraŭ liaj diversaj meritoj por la literaturo kaj la esperanta movado ĝenerale.






Necesus ampleksaj kaj detalaj esploradoj pri tiu tre delikata afero, por povi prilumi la cirkonstancojn kaj klarigi la motivojn de la hungara famulo Kálmán Kalocsay; li ja estis la esperantiginto de “Vita di Arnaldo”, verkita de Benito Mussolini, por honori sian faŝistan fraton.

Arnaldo mortis en 1931 pro kormalsano kaj lia postmorta biografio aperis en 1932. Du jarojn poste la esperanta traduko estis eldonita sub la titolo “Vivo de Arnaldo”. La eldonejo estis

"Literatura mondo" en Budapeŝto. Sur paĝo kvar ni legas: "La esperanto-eldono de tiu ĉi libro aperas post la propono de s-ro *Ugo Vinicio Pacini*, per la financaj rimedoj de s-ro *Gino Catarzi*, per la afabla interveno de la *Esperanto-Centro Itala* ĉe la posedanto de eldonrajtoj **La Popolo d' Italio**, kiun ni aparte dankas pro la senpaga permeso de la publikigo."

Tiu Gino Catarzi, estrarano de ECI, ankaŭ verkis longan poemon "Antaŭvortoj" kun alparolo "**DUCE!**" Ĝi estas honorcela dediĉo al la komplico de la militkrimuloj Hitler kaj Franco.

Faksimile, je la fino oni trovas kopiojn de manuskriptoj el la testamento de Arnaldo. Krome "Plano de definitiva itallingva eldono pri la verkoj kaj paroladoj de Benito Mussolino", en naŭ volumoj. Ĉiu titolo estas esperantigita, kvazaŭ kiel anonco de pliaj tradukoj far Kalocsay.

Intermeze mi tamen devas deklari, ke la celo de ĉi artikolo estas nek organizo de persekutado de sorĉist(in)oj, nek akuzado de unuopuloj kiel Kolomano, kiun mi senĉese admiras kiel esperantanon. Ĉar esperantujo ne bezonas mitojn, necesas serĉi kune kun legantoj de LVL kaj aliuloj kaŭzojn, celojn kaj motivojn en la tiama epoko, kiuj instigis eĉ akademianojn kiel Kalocsay agi malmorale kaj kontraŭ la filozofio de Zamenhof. Bonvole mi estos atentigota pri iu(j) ajn verkaĵo(j) de Koloman, en kiu(j) li klare bedaŭras, plenhonte kaj pentante, ke li terure eraris, eble eĉ opiniinte tiel servi la progreson de la movado, kiu tiom ofte kaj prave honoris lin!






Ĉiel, post la dua mondmilito, Kalocsay sendube estis bone informita pri la tragedia sorto de kelkaj zamenhofidoj (Lidia kaj Felikso) en la koncentrejoj de la germanaj faŝistoj. Ĉu li ekkomprenis, sed tamen silentis, por protekti sian reputacion? Kiel jam dirite (vidu parton unu en la antaŭa numero de LVL!), nek Ulrich Lins, nek Ziko Marcus Sikosek mencias la aferon "Arnaldo" kaj la rolon de Kálmán, probable timantaj malhelpi la movadon. Do, ni petas la legantojn de LVL informi nin, se ili povus montri al la redakcio tiajn dokumentojn de la hungaro. La vero ankaŭ havas rajtojn…

Restas evidente la demando, ĉu ni observu la faktojn el la nuna aŭ el la tiama vidpunkto de la historio, aŭ el ambaŭ samtempe … Ne estas problemo por mi akcepti hiatojn en la ĝenerala historio, sed ankaŭ en tiu


➔

# Ŝtatprezidinto, kiu simpatiis Esperanton

*James Rezende Piton*

Politikistoj estas inter tiuj, kiuj plej sukcesas en la arto plaĉi. Sufiĉas eta gesto, kelkaj paroloj, foje vizito por konkeri malproporcie multajn korojn kaj mensojn. Kaj ilia skipo certe atentas pri ĉia dato, ĉia jubileo, ĉia evento ebla por sendi ŝablonan gratul-mesaĝon.

Okaze de la 90-a datreveno de Hungaria Esperanto-Asocio en 1992, la tiama hungara ŝtatprezidanto Árpád Göncz sendis gratul-mesaĝon, kiu estis multe pli ol ŝablono. La budapeŝtano, unua prezidanto post transiro el la socialisma periodo, estis verkisto kaj tradukisto de cento da libroj, tial lingvo kaj lingvo-lernado multe pli koncernis lin, ol la plej multajn politikistojn. El la angla li tradukis ekzemple “2001: Spac-odiseo”, de Arthur C. Clarke. Li cetere tradukis al la hungara la trilogion de Esperanto-simpatianto, Tolkien, kun *La Majstro de l’ Ringoj*. La tre signifa mesaĝo de Göncz aperis en la revuo “Esperanto” n-ro1038 (junio 1992) kaj ni reproduktas ĝin:




*“Karaj Amikoj!*

*Mi komencu per konfeso. Mi neniam lernis Esperanton, sed mi tre bedaŭras ke ĝi kiel multo alia - mankis en mia vivo. Male al la lingvoj angla, itala aŭ precipe la germana kiujn mi alproprigis iom post iom, kun pli-malplia sukceso, Esperanton mi ĉiam konsideris* La Lingvo*: la idealigita lingva stato de senescepteco, de antaŭvideblaj kaj respekteblaj leĝoj kaj reguloj. Lingvo en kiu malkiel en ĉiuj aliaj latentas, almenaŭ potenciale, perfekta ellernebleco.*

de nia movado. Ankaŭ esperantistoj rajtas post grava eraro diri kiel kelkaj romiaj eminentuloj: “Erari estas tute homa” kaj “Nenio homa al mi estas fremda”. Kalocsay certe konis la latinajn ĉefverkojn…

NdR: La portreto de Kálmán Kalocsay aperas kiel talono de hungara poŝtmarko, kies desegnaĵo estas la zodiaka signo “Fiŝoj”, konstelacio en Februaro. En 2006 ĝi estis pretigita de Ada Csiszár, okaze de lia 30-jara morto-datreveno (je la 27-a de februaro 1976).

*Kiu jam provis, foje kaj refoje, konkeri la nevenkeblan fortikaĵon de nepropra lingvo, tiu scias pri kiel grandega tento temas. Sed mi ankoraŭ ne menciis la plej gravajn faktojn. Ekzemple tion ke Esperanto, lingvo translingva kaj translima, kapablas kunligi popolojn, homojn, sortojn kaj kulturojn.*

*Okaze de la 90-jariĝo de Hungaria Esperanto-Asocio, bonvolu akcepti, signe de mia estimo, jenajn improvizitajn ideojn:*

*Mi scias ke, dum sia 100-jara historio, via movado ĉiam pledis por la principoj de solidareco kaj fido, fortigis la internan liberecon de la landoj kaj kontribuis al la pacaj interrilatoj de ŝtatoj kaj nacioj.*

*La valoro de viaj streboj kreskas en la nunaj tempoj de nova Eŭropo - des pli ke vin karakterizas la emo rigardi al la estonteco kaj la klopodo gardi viajn proprajn kulturon kaj valorojn per la ekkono kaj respekto de alies kulturoj.*

*Al tiu ĉi laboro via, helpe servanta landojn kaj popolojn, mi deziras multajn pluajn sukcesojn.*

*Koran saluton al la jubileantaj esperantistoj!*

*Prezidanto de la Hungara Respubliko"*

Li fariĝis tre populara kaj reelektiĝis en 2005, kun mandato tra la tuta jardeko. Maksimum-karto, poŝtmarko kaj poŝtstampo estis eldonitaj por la centjariĝo en novembro 2022, sur kiu videblas lia subskribo.

## Librairie Hachette en filatelaĵo

*James Rezende Piton*

En 1868 oni elpensis en Britio iun sistemon por identigi poŝtmarkojn, tiel ke ili povas esti strikte ligitaj al la posedanto, ĉu individuo, entrepreno aŭ registara instanco. Tio povis ne nur malkaŝi, ke la poŝtmarkoj estas uzataj de neposedantoj por aliaj celoj kaj eĉ eviti, ke ŝtelisto forprenu kaj vendu ilin. Tiu sistemo konsistis el trapikaĵoj, kiuj formis du-tri literojn (ili plejofte estis komencliteroj), sed trapikaĵoj estis faritaj ankaŭ kiel simbolo - monogramoj, ankroj, flagoj, steloj.

Ili estis bulke produktitaj de la posedanto mem, per malgranda trapikmaŝino. Rilate al la bildo de la poŝtmarko, la trapikaĵoj povis aperi en unu el kvar eblecoj: normala, renversita, spegulita aŭ renversita kaj spegulita. Ĉio dependis de la maniero enmeti la poŝtmarkojn/foliojn en la maŝineton.

Ekzemplero el la 1920-aj jaroj, la trapikaĵo **L.H.** estis produktita de Librejo Hachette, la sama pariza entrepreno, kiu kontraktis kun Zamenhof ek-

de 1901. Ĝis 1905 la eldonejo aperigis tridekon da titoloj en la serio *Kolekto Esperanta aprobita de d-ro Zamenhof*. Inter 1908 kaj 1914 aperis ĉe Hachette *La Revuo.* La eldonejo fermis sian Esperanto-fakon post la Unua Mondmilito.





Kiam la trapikita poŝtmarko estas uzita sur koverto, la aŭtoreco de la trapikaĵoj estas nemiskomprenebla.










Noteto de ElDo:

Certe ĉiu ĉion scias pri ĉi fama eldonejo, sed kial ne refreŝigi ies memoron?

En 1826 estis fondita de Louis Christophe Hachette (1800-1864) la *Librairie Hachette & Cie*. La konata matematikisto, Carlo Bourlet, kies fakajn lernolibrojn pere de ĝi jam li publikigis, iĝinte esperantisto en 1900, aranĝis julie 1901 kontrakton inter la editoro kaj Zamenhof por aperigo de E-libroj. Ĉar la eldonejo havis filiojn en la tuta mondo, tio faciligis la akiron al interesatoj de libroj en aŭ pri E-o.

La poŝtkarto kaj trapikita poŝtmarko estis akiritaj aŭkcie de la aŭtoro de ĉi artikolo.




## Ek al EEK 2024 en Strasburgo!

La Hejmo de pluraj eŭropaj institucioj gastigos la Eŭropan Esperanto-Kongreson de la 8-a ĝis la 12-a de majo. Ĝia inaŭgur-dato koincidas kun la Tago de Eŭropo, nome kun la 9-a de majo. La kongresa programaro disvolviĝos en *Le Patio*, universitato facile alirebla de la urbocentro. Ĉi aranĝo estas organizita de Espéranto-France partnere kun GEA, BEF, IEF, IFEF kaj ILEI kaj apoge de UEA, EEU kaj JEFO. Temo de la kongreso estas *Dialogo inter eŭropaj popoloj, portanto de paco*. Esperanto estos inde prezentita en sia rolo de interkomunikilo por kaj ligilo inter ĉiuj popoloj tra la mondo.

Dum la antaŭpreparoj prikongresaj, la germana esperantisto Goar Engeländer lanĉis jam junie 2023 brilan ideon kaj tuj poste aktiviĝis cele al ties konkretigo. En kio konsistis tiu ideo? Instigi ĉiulandajn eŭropajn asociojn, eldoni propran individuan poŝtmarkon (IPM) rilatan al la kongreso.

Unue estis desegnitaj diverstipaj emblemoj kaj fine estis elektita la bildo kreita de Toni Espinosa el Hispanio *(vidu la supran glumarkon)*. Grava kondiĉo tamen - prave! - estis, ke la emblemo estu ĉiam la sama, nome la cikonio kaj la stela ringo; kompreneble eblas ĝin adapti al la poŝtmarkaj formatoj, kutime uzataj en la koncerna(j) landoj(j).

Akceptis tiun proponon, ĝis nun, tri landoj: Francio, Germanio kaj Hispanio. Pri aliaj landaj asocioj informoj estos donitaj kiel eble plej rapide.

Estus vere bone, se aperos diversnaciaj pm-oj, kiuj konkrete montros en kiom da landoj estas disvastigata nia lingvo kaj kiom granda estas la interesiĝo pri Esperanto en la filatela kampo.

Jen la jam pretaj poŝtmarkoj: sinsekve la franca, la germana kaj la hispana.









La bildo, kiel jam dirite, estas tute sama por ĉiuj pm-oj, nur ĝi estas adaptita al la respektiva pm-grando.

La pm-mezuroj estas pli-malpli la samaj: proksimume 40 mm x 30 mm.

La skribo EEK aperas nacilingve en la franca kaj hispana pm-oj, dum sur tiu germana ĝi estas en Esperanto: *Eŭropa Esperanto-Kongreso*. *Strasburgo,* la nomo de la gastiganta urbo, estas en ĉiuj tri naciaj lingvoj, samkiel la dato: 8 -12 majo 2024. La pm franca kaj eksterlanda, dum la aliaj du nur por havas du nominalojn por sendo enenlanda ekspedo.

Interesiĝantoj povas aĉeti:

La germanajn ĉe Elke Mondorf - gea.oficejo@esperanto.de

La francajn ĉe Michel Basso - clbm@orange.fr

La hispanajn ĉe Manuel Parra - admin@esperanto.es

Supozeble estos eldonitaj kaj okazaj poŝtkartoj kaj stampo (ĝi aperos nur en Strasburgo). Konklude, filatelan dankon al la kunorganizantoj pro tiu ĉi imitinda iniciato kaj plensukcesan kongreson deziras tutkore EIDo




Ĉu vi iam ajn ricevis tiel malordinaran, malkutiman, originalan koverton? Danke al la sendinto José Salguero, nia samligano el *Don Benito*, mia kolekto pliriĉigas per unikaĵo! Sur ĝi ankaŭ la ĵus eldonita EEK-pm. Gustuminda bombono, ĉu ne?

## IPM EL POLLANDO

*Elda DOERFLER*




El la informoriĉa kaj interesa revuo *Pola Esperantisto*, Nov-Dec 2023, lerte kaj sperte redaktita de Robert Kamiński, oni ekscias pri nova poŝtmarko eldonita de la nacia Poŝto.

Ĝin iniciatis la esperantistoj *Grupe 2023* en Gliwice: do, nova IPM eniras nian katalogon!

Ne konante la polan, mi petis helpon al tradukanta Guglo, pri la verda skribo: ĝia respondo ne kontentigis min, mi provis per alia tradukilo kaj jen la konkludo: *25. Uzantoj de Gliwice datas kaj praktikas Esperanton*. Ho ve! La tuto perdigas al mi tro da tempo. Do, kion fari? LVL malfruas, absolute ĝi devas esti preta por morgaŭ. Mi provu diveni: *25-a datreveno en Gliwice de uzantoj kaj praktikantoj de Esperanto*. Nu, atendeblas ke mia retmesaĝujo estos rapide superplena je aĉaj (merititaj!) kritikoj de la pola samideanaro.

Sed ni revenu al tiu belaspekta pm. Sur verdhela fono elstaras la urba blazono kaj nia stelo. Meze, parto de la urbocentro kun la tipaj arkadoj kaj preĝejo kun alta sonorilejo. La tarifo A egalas al 3,90 zlotoj, por sendo enkaj eksterlanda.


Pollando ĉiam kun aparta favoro rigardis al la genia iniciatoro de Esperanto, doninta prestiĝon al la tuta lando. Ĉi tie indas rememori, ke pri tio atestas la oficiala rekono de la graveco de la Internacia Lingvo, kiam ĝi estis enskribita en la Pola listo de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj: grandioza historia evento!

Aparta konsidero estis donita ankaŭ de la Nacia Poŝta instanco, kiu en 1959, okaze de la centjara naskiĝdatreveno de LLZ, emisiis du pm-ojn, sekvis alia en 1962 por la 75-a Jubileo de E-to kaj en 1966 aperis tutaĵo por la 20-jara datreveno de la E-Movado en Pollando (1945-1965). En 1987 la tuta Esperantujo festis la 100-jariĝon de nia lingvo kaj tiam aperis pola pm kun bildoj de Zamenhof kaj la verda stelo.




Dum kelke da jaroj, la Poŝta instanco silentis, sed jen gravega evento en 2009: la 94-a UK en Bjalistoko, la naskiĝurbo de nia Majstro. Atentinda kaj atendita okazaĵo, dum kiu multaj eksterordinaraĵoj feliĉigis la esperantistaron, precipe la filatelemajn. Naŭ diverstemaj, vere artaj, poŝtkartoj el la vivo de LLZ, glumarkoj, medaloj, du di-

versaj stampoj plus unu aparta por la vojaĝantoj sur la trajno “Zamenhof” entuziasmigis ĉiujn tiu abunda rikolto! Kaj al tio aldoniĝis eĉ tutaĵo:





Pasas la jaroj, kaj jen plia bela surprizo fare de la Pola Poŝto: kroma tutaĵo en 2017! Cent jaroj de la publikigo de la gramatiko de la Lingvo Internacia por poloj, sur kiu aperas eĉ poŝta stampo. R. Kostera projektis la tutaĵon, eldonitan en dekmil ekzempleroj.




Intertempe en pluraj landoj ekestis la eblo mendi de la Poŝto poŝtmarkojn, la tiel nomatajn Individuajn (IPM) aŭ Personigitajn, sur kiuj aperas bildoj de iu ajn proponataj, laŭplace. Kompreneble ili kostas iom pli ol la ordinaraj, en la senco ke oni devas pagi la eldonservon. La kromkosto dependas de la ordinaraj tarifoj en la liveranta lando. Kiom da E-IPM estis produktitaj en Pollando, malfacilas scii. Ekzemple, nia brazila amiko Roberson aĉetis, tra sialanda retaŭkcio, polan IPM-on, kiun neniu el ni antaŭe konis. Kiel kutime, ofte temas pri nura bonŝanca hazardo. Ĉi-sube kvar polaj IPM, eldonitaj en diversaj jaroj.

2009 - Oficiale eldonita pm, 20.20 zlota, ricevas apudan talonon kun la bildo de *Ludwik Zamenhof 1859-1917*, menditan de… nenio sciatas!




Tre bela IPM, eldonita aprile 2017, okaze de la *130-datreveno de Esperanto*, kiel legeblas sur la kompleta folieto. Pli sube estas aldonite, ke temas ankaŭ pri la *110 jaroj de ekzisto de la E-Movado en Bydgoszcz (1908-2018)* kaj *100 jaroj de la morto de L. L. Zamenhof.*

Tute malsupre, la simbolo de *IFEF, Internacia Fervojista Esperanto-Federacio*.

Sub la bildo de Z, neeblas deĉifri la skribon. Aliaj detaloj ne troveblis.




2018 - 2 IPM faritaj en Krakovo. Nenia sciigo pri ili.




Kaj nun la lasta pola IPM (eble!). Nekonata la jaro. Mi kredas, ke iun tiel malbelan neniam mi vidis, tamen tio estas nur mia persona opinio. Tarifo A - enlanda sendo; ***160*** *(ĉu jaroj?)* apude la framasona simbolo; fine la skribo: *Framasonismo kaj Esperanto Unuiĝinta por pli bona mondokaj* (tiel!) kaj pri daŭrigo komprenu VI kion vi deziras!

Konklude, mi aldonas iun mian penson. Ekde kiam aperis la unua Esperanto-rilata IPM, mi sekvis dum iom da tempo tiun fenomenon scivoleme sed ankaŭ kun kapo plena je multaj demando-signoj. Je certa punkto, …. tamen tio estas tute alia historio, kiu iĝos temo de iu alia el miaj venontaj artikoloj.


# Kiuj Esperanto-aĵoj kolektindas?

*Elda Doerfler*

Se oni vizitas la Esperanto-Muzeon en Vieno, pere de ties retejo, oni havas unikan ŝancon, trovi ĉion pri nia lingvo, de libroj, ĵurnaloj/revuoj, fotoj, aŭtografoj, dokumentoj kaj manuskriptoj, ĝis afiŝoj kaj poŝtkartoj, insignoj kaj glumarkoj..., ĝis la plej strangaj objektoj realigitaj de nia samideanaro aŭ ... de simpatiantoj. Krom tio eblas konatiĝi kun pli ol 500 planlingvoj, aperintaj en pasinteco kaj eĉ en pli proksimaj jaroj, temo aparte studinda ankaŭ por ekscii la intimajn kialojn instigintajn la aŭtorojn defii sin mem, en penega strebado al kreo de universala lingvo. Sed tiu ĉi estas tute alia, pli serioza, temo!

Estas interese malkovri, kiom da aĵoj ekzistis, kaj ekzistas, sur kies surfaco sin montras skriboj en la internacia lingvo aŭ tutsimple la nomo *Esperanto*. Havante tempon por esplori funde la muzeon, oni facile konstatos, ke homa fantazio ne konas limojn, precipe kiam disvastigcele oni aspiras atingi ĉiajn tavolojn de la homa grupo. Sufiĉas esplori ekz. la periodaĵojn pasintjarcentajn, kun nura emo spuri la reklamojn en ili aperantajn: oni estos kaptita de la kvanto de proponitaj, plej strangaj, aferoj.

Aktuale simpla navigado en retejoj helpas malkaŝi nekonatajn esperantaĵojn, kiuj tikle stimulas onian kolektemon. Bezonatas kompreneble iom da pacienco... Nu, se vi deziras efikan digestigan likvoron, ja ĝi ekzistas ie: kie - mi ne scias -, estos do via tasko trovi ĝin.







Atende, vi povas ĝui pipan fumadon per tabaka miksaĵo importita de Danlando, ĉefe dum vespera legado de E-ĵurnalo sub la brila lumigado de E-lumigilo *(vidu sekvapaĝe!)*.





*Ĉirkaŭ el 1930, franca lampo* L'Esperanto. *Mezuroj 10×18 cm.*




Aŭ eble povas vin interesi metala kuiraparato? Ĝi funkcias per alkoholo. Bedaŭrinde ŝajnas, ke ĝi senas je kelke da pecetoj, tial mi ne emis ĝin aĉeti. Plej probable ĝi estis produktita de la sama fabriko kiu elfaris la lampon.

Ĉu vi kolektas horloĝojn? Vasta gamo de tiuj troviĝas rete, plej parte modernaj, tial ne tiom interesaj, ĉu? Komence de la pasinta jarcento, kaj pli precize okaze de la 2-a Universala Kongreso en Ĝenevo, 1906, aperis belaspekta kaj bonkvalita poŝhorloĝo, nomita *L' Espero*, *s*ur kiu disradias stelo. La poŝtkarto informas pri ĝia kosto: nur 18 F^kojn^. Plejkredeble ĝi ne plu troveblas, ĉar dumkongrese certe staris antaŭ la vendogiĉeto longa vico da entuziasmaj aĉetontoj. Ja temis pri aŭtentika artaĵo. Feliĉe en 1912, ĝi ree prezentiĝas al la publiko, kiel atestas la Oficiala Jarlibro de UEA, en kiu videblas reklamo tutpaĝa, kies allogaj klarigoj logas: *"El blanka, tre fortika metalo, oksidita kiel malnova arĝento, kun reliefa kovrilo kaj stelo, laŭ deziro verde pentrita. Preciza radaro je ankro kun 15 rubenoj, plene garantiita por ekzakta funkciado. Utilega al ĉiuj esperantistoj. Tre ŝatata donaco".* Produktita de la famkonata svisa fabrikejo, *L'Espero*.




UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO
*Rue de la Bourse, 10, GENÈVE* (Svis.)
PÔSHORLOĜO : L'ESPERO A.
El blanka, tre fortika metalo, oksidita kiel malnova arĝento, kun reliefa kovrilo kaj stelo, laŭ deziro verde pentrita. Preciza radaro je ankro kun 15 rubenoj, plene garantiita por ekzakta funkciado. Utilega al ĉiuj esperantistoj. Tre satata donaco.
Prezo : 30 fr. = 12 $
Afrankita en la plimultajn landojn : 12.65 $
Sola reprezentanto de tiu ĉi kaj de alispecaj horloĝoj de fame konata svisa fabrikejo. Marko : *L'Espero*.
Oni postulu la prezaron kun multaj modeloj por sinjoroj kaj sinjorinoj, kaj juĝoj pri ĝis nun liveritaj horloĝoj.

Ŝanĝiĝis en tiu 1912 bedaŭrinde la prezo: de 18 al 30 Fr! Ja inflacio trafis esperantistojn!


Prezo : 30 fr. = 12 $
Afrankita en la plimultajn landojn : 12.65 $

Plej kredeble ĉi belaĵo malaperis el la mondo aŭ, eble, kaŝiĝas ie en tirkesta sekretejo, preteratentita de la heredantoj de iama E-pioniro.

Nuntempe oni devas kontentiĝi je ĉi tiaj horloĝoj:


*1960 - por virino*
*65 eŭroj*


*1965 - por viro*
*740 eŭroj*


*1970-1979*
*De Luxe - 250 eŭroj*



*Ne indikita la jaro - Virina horloĝo. Oni reklamas ĝin per jenaj vortoj: aŭtentika raraĵo!!!*
*Nur 24,90 eŭroj la kosto: per eta monsumo oni feliĉigus ĉiun ajn virino!*

La supre montritaj horloĝoj altiris mian atenton, ĉar ĉiuj venas el la sama fabriko, svisa, kies marko estas *Esperanto*. Pri tiu firmao akireblis malmultaj informoj; nur sciatas, ke ĝi ne plu ekzistas, malfondita eble en la 1980-aj jaroj. La maldekstra poŝhorloĝo el ĉ. 1960 estas tre ĉarma kaj eleganta, speciale farita por virinoj, produktita de la sama firmao. Ĝia kosto estas 64,17 €.



Tamen se vi ŝatas tutesperantan horloĝon, jen je dispono io nemalhavebla. Ne indikita la jaro sed ĝia prezo estas relative modesta (*dependas de la vidpunktoj!*) = 51 € kaj ĝi aĉeteblas ĉe

https://wwwww.zazzle.com/esperanto_watch-256246295194132 47



Kaj nun lasta perlo! Miru, miru kaj admiru!







Ĝi aperis aŭkcie en la ebay-a paĝaro duone de decembro pasintjara. Tute alia de tiu produktita de firmao *L' Espero*: aŭtentika valoraĵo!

Oni ĝin prezentis per pompaj vortoj:

**Antikva ornamita poŝhorloĝo, fajne cizelita, kun sur la ciferplato la bildo de L. L. Zamenhof, kreinto de la lingvo Esperanto.**

En la sufiĉe ampleksa priskribo legeblas, ke ĝi estas perfekte funkcianta, ke sur la plato estas la devizo: *Ni laboru kaj esperu*, ke la horloĝtegaĵo estas el arĝento, ke sur ĝia malantaŭa parto aperas signifoplena prezentaĵo kaj fine, ke - aŭdu, aŭdu gesinjoroj - tiu mirindaĵo estis farita ĉirkaŭ en la jaro 1890! Ha, ankoraŭa aldono: oni asertas, ke ĝi estis realigita ĝuste por doktoro L. L. Zamenhof mem. La diametra mezuro estas 55 mm.

La bildo sur la tegaĵo memorigis al mi la apudan poŝtkarton, kiu estis eldonita proksimume en la 1903-a jaro. Sed mi ne certas pri ĉi tiu mia aserto, ĉar tio estis deduktita surbaze de la stampodato, tial volonte mi akceptas onian korekton.




Sed mi daŭrigu: kontrolante la ttt-ejon de la vendisto - ho, kia surprizo! - mi rimarkis, ke la bonŝancega posedanto de tiu unikaĵo havas en sia kiraskesto eĉ tri el tiuj poŝhorlogoj, kiujn li vendas diverspreze: je 2 089,12 €, 2 072,13 € kaj eĉ 1 701,67€. La *raraj* horloĝoj troviĝas en Sofio, Bulgario, kaj estos senditaj perpoŝte, tute senpage! Konklude, lia certigo pri *unikaĵo* estas, sen ajna ombro de dubo, kontraŭdirita de la triopo aŭkcie proponita.

Kroman informon mi aldonas: okaze ke vi nepre deziru akiri tiun *rarajon*, vi povus iom ŝpareti, vizitante ĉi tiun ttt-ejon: https://auctionet.com/en/2981931-remontoir-clock-allegory-to-esperanto-silver-metal, kie la kosto de la sama objekto egalas al 70 eŭroj, se ne estos aliaj aŭkciemuloj!

La tialo de mia postĉasado de *Esperanto-aĵoj* estis, estas kaj estos, finfine trovi la originalan poŝhorloĝon el 1906, kiu - mi certas - ie kaŝitas.

Revi kostas neniom, kaj por mi, fervora kolektemulo, signifas daŭre studi, esplori, konsulti la plej malnovajn publikaĵojn, enkapigi historiajn nekonataĵojn, por iel provi kompletigi la ampleksegan historion de nia Esperanto-mondo. Pere de *unikaj* kolektindaĵoj, kompreneble!





## EN POŜTOKESTO

ATENTIGO DE ANDRÉ DEBERTONNE

Nia samligano, longjara membro de ELF-AREK ekde 1973, sendis rimarkon rilate artikolon, publikigitan je paĝo 22-a de LVL n. 192.

Ĉi klarigon li donas: *Temas pri tiu glumarko, ne eldonita ŝajne, en la urbo Evreux. Vi situis ĝin en la departemento* Eure et Loir. *Sed tiu urbo estas la ĉefurbo de la departemento* Eure *(kodo 27). Tiu ĉi situas norde de tiu* Eure et Loir *(kodo 28) kun ĉefurbo* Chartres. *La dep.* Eure *havas la nomon de la rivero* Eure*, kiu fluas norden ĝis la riverego* Seine. *Sed la dep.* Eure et Loir *havas la nomon de du riveroj:* Eure *por la norda parto kaj* Loir *por la suda parto. Tiu rivero* Loir *fluas suden ĝis la riverego* Loire *kun la famaj kasteloj. Tiu departemento, kie mi naskiĝis, estas dividita inter du riverbasenoj.*




Kion respondi? Nuran dankon al amiko André pro lia rimarko kaj apartan dankon mi, kune kun la aliaj redaktantoj, adresas al li pro liaj leterkonkludaj vortoj: *Mi estas tre dankema pro la diversaj artikoloj de la bulteno, kun tre riĉaj traserĉoj*. Ni ĝoje akceptas tiun belan komplimenton, signifantan ke nia laborado estas aprecata. LA REDAKCIA SKIPO

# Interesa kaj fruktodona ret-kunveno

*Elda Doerfler*

Tatjana Loskutova (Татьяна Лоскутова), la tre bone konata rusa samideanino, lingvo-instruisto, verkisto de lernolibroj por ruslingvanoj, diplomita de UEA en 2016 pro elstara agado, lerta organizanto de E-karavanoj en ĉiuj kontinentoj kaj eĉ reprezentanto de Eŭropa Komisiono en Rusio, invitis Elf-Arek-on al sinprezento antaŭ ŝiaj diverslandaj retaj gelernantoj. La renkontiĝo, okazinta la 27-an de januaro ĉ.j., estis tre plaĉa kaj min plezurigis la interesiĝo de la ĉeestantaro. Prie, mi ricevis iliajn skribajn impresojn. En bona Esperanto, kompreneble! Tial, ĉi-foje, *premiere*, mi konatigos al vi unu el tiuj skribaĵoj. La teksto estas de Aleksej Juravljov, el Rusujo.

*La prezento kaj raporto pri Esperanta filatelismo ŝajnis al mi sufiĉe interesaj. Kvankam mi mem neniam interesiĝis pri kolektado de pm-oj, en mia infanaĝo mi havis ekzemplon de tia ŝatokupo. Junaĝe, mia patrino kolektis pm-ojn dediĉitajn al monda arto kaj havis eĉ 3 albumojn el tiuj. Mi mem kolektis monerojn en infanaĝo, sed ne kiel pasia numismato, simple por amuzo. Ekde tiam restas ĉe mi malgranda kolekto.*

*Nun mi havas malgrandan kolekton de virtualaj pm-oj en la aplikaĵo 'Slowly' per kiu mi korespondas kun esperantistoj el diversaj partoj de la Mondo. Tial, la temo proponita en la lasta lekcio estas iom proksima al mi. Kvankam la parolmaniero de s-ino Elda estis por mi iom malfacila, mi povis kompreni la ĉefajn signifojn. Neniam mi renkontis tian specife fakan temon, do mi interesiĝis lerni la historion de la originoj kaj evoluo de Esperanto-filatelo, numismatiko kaj iomete aliaj specoj de kolektado. Estis interese ankaŭ mallonge ekscii pri la evoluo de la esperantista filatela movado de malgranda grupo ĝis tuta ligo de kolektantaj entuziasmuloj kun propra organo kaj multaj sekvantoj. Kaj ĝi estas impresa! Kiel mi promesis, mi ankaŭ ŝatus sendi al s-ino Elda la fotojn de sovetuniaj Esperantaj poŝtkartoj kaj la ligilon al la apo, pri kiu mi menciis dum la lasta leciono. Mi alkroĉis fotojn al mia letero, kaj lasas la ligilon ĝuste ĉi-tie: https://slowly.app*

Kaj ja, kontakto efektiviĝis, kaj nun, danke al Aleksej, vi povos rigardi filatelaĵojn, riĉigitajn per interesaj, por mi eĉ tute nekonataj, klarigoj.

Bedaŭrinde, pro spacomanko, mi povas prezenti nur unu pk-n, sed en venontaj LVL mi klopodos aperigi kaj la aliajn verketojn de la gelernantoj kaj la alian rusan esperantaĵon.

Sur la sekva kovrilpaĝo: antaŭo kaj malantaŭo de Poŝtkarto N° 139 - eldonjaro 1929. Detaloj pri la malantaŭa flanko: maldekstre, supra angulo - simbolo de la Ŝtata *Tretjakova* Galerio en Sovetunia periodo; perpendikulare: Eldono de la Galerio. Suba priskribo: V.V. Vereŝĉagin - Buĥara soldato (ruse kaj france); sube, centre: N° 139. Kosto 8 kopekoj. Dekstrangule: Loko por (poŝt) marko. Dekstre, rilate al adresoj: Kien_____; Al kiu ____. ĈDLE (Ĉefa Di-

# ELF-AREK

## Esperanto-Ligo Filatelista
## Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

**Prezidantino:**
**Elda Doerfler**
**Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE**
**testudo.ts@gmail.com**

**Jen mia bankokonto:**
**IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta**
**BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler**
**UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx-r**
**Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00**
**Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.**
**Kunredaktantoj: James Rezende Piton - sudastelaro@gmail.com**
**Albert Boon, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be**
**Elf-Arek ttt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc**

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

rektoro pri Literaturo kaj eldonado) № A – 27841. 25 000 ekz. (ekzempleroj). Moskvo, 1929. GOZNAK (akcia Kompanio *Goznak* estas ĉefa Direktoro pri produktado de Ŝtataj Insignoj, moneroj kaj ordenoj, Mitnaja, 17 *(=strato)*.

Kore mi dankas la amikon Aleksej pro tiel detala klarigo. Espereble ankaŭ vi liganoj estos kontentaj pri ĉi interesa priskribo.



